

Ni invitas vin partopreni en staĝo celanta klerigon de la gvidantoj-ĉiĉeronoj por la Universala Kongreso en Lillo en 2015. La akirita kompetenco utilos ie ajn.

La staĝo taŭgos ankaŭ por prepariĝi al la faka branĉo "Turismo kun Interpretado" de la **Atesto pri Kapableco** de FEIkaj ĝin gvidos du profesiulinoj pri turismo... kaj ne nur.

STAĜO POR ĈIĈERONOJ

Kvinpetalo, 10-15 Junio

Kion ni traktos?

- Eroj kaj ecoj de ideala ekskurso

- laŭ la diversaj tipoj de ekskurso-celoj
- laŭ la veturado / biciklado / piedirado...

- Preparad-teknikoj

- divers-fakeco, trans-fakeco (de socipolitiko ĝis arkeologio tra popolkulturo...)
- ekvilibrado de la informoj...

- Adapto al la kultura diverseco de la U-Kongresanoj

- Grup-mastrumado

- Rilato kun ŝoforo kaj aliaj kunlaborantoj (restoracio...)

- Publika parolado

- Tempo-mastrumado

- Rolo, sinteno kaj etiko de UK-ĉiĉerono

Kial, kiucele?

Ni celas altan kvaliton por la ekskursoj, kaj tio implicas multajn kompetentojn. Ĉiu trejnato plibonigos kaj plidiversigos siajn, laŭ persona skemo, laŭ sia aktuala nivelo en ĉiu el ili.

Alta kvalito ne signifas elitajn kulturan nivelon, sed kunigon de la necesaj ecoj por plej kontentigi la ekskursantojn kaj plej efike vekti ilian intereson, komprenemon, observemon kaj entuziasmon. Tiel ke ili memoru la ekskurson kiel tutan indan travivaĵon.

Kiel?

Ni kreos malkonkurencan, solidaran, ret-laboran etoson por preparadi la komunajn bazojn (pri urba & regiona historio, geografio, lingvo, arkitekturo & aliaj artoj, aktualeco kaj ceteraj kulturaj aspektoj) kaj la diversajn ekskursojn.

Kie? Kvinpetalo!

Alloga loko, turisme riĉa, taŭga por praktikado!
Hejmaj bongustaj manĝoj.



Kiuj gvidos?

Catherine Kremer estas arthistoriisto kaj profesia ĉiĉerono kun diversa sperto kaj klerigado, gvidas turismajn semajnojn en Esperanto.

Anne Amblès estas trejnisto kaj pri team-kunlaborado kaj grup-vivigo, estis profesia internacia ĉiĉerono dum 15 jaroj, aktivadis pri justa turismo. Studis lingvojn, art-historion, turismon, konflikto-mastrumadon.

Kiam?

Junio 2014

Kiom?

Vidu la retejon de Kvinpetalo: <http://www.kvinpetalo.org/>

Baze: aliĝo 50 eŭroj (minus 15 se aliĝo minimume unu monaton antaŭe). Tuttaga restado (tranokto, + tri manĝoj), 35 eŭroj. Se iu aliĝas nun por 5-taga staĝo, tio estos 35 + 175 do **210** eŭroj.